

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 320 (86) KVINA EPOKO

JANUARO-FEBRUARO 2002



ASSOCIACIÓ  
CATALANA  
D'ESPERANTO



KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO

Apartat, 290 - 08200 - SABADELL  
CATALUNYA - KATALUNIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio  
per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo  
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj  
Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj *Esperanto*, Kontakto kaj libroj), FEL  
(revuo *Monato* kaj libroj), IKEL, *Literatura Foiro*, *Heroldo*, *La  
Kancerkliniko*, *La Ondo de Esperanto*, *Litova Stelo*, *Scienca  
Revuo* (ni peras ankaŭ aliajn revuojn)

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental)  
Catalunya/Katalunio Tel.93-710 96 36 Fakso: 93-716 36 33

Ret – adreso: kea@esperanto-ct.org

Ret – paĝo: <http://www.esperanto-ct.org>

Kotizoj por la jaro 2002: Individua Abonanta Membro 25  
eŭroj; Individua Subtenanta Membro 50 eŭroj; Individua  
Dumviva Membro 500 eŭroj; Kolektiva Membro 50 eŭroj;  
Juna Membro 16 eŭroj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona – Agència  
461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa;  
vicprezidanto: Joan Inglada; kasisto kaj provizora sekretario:  
Llibert Puig; komitatanoj: Roger Prieto, Anna Casasús,  
Arnald Massanas

Kontrola Komisiono: Sebastià Ribes, Òscar Puig, Xavier  
Murcia.

Kataluna Esperantisto: Llibert Puig, Marina Ollé.  
Revizianto: Hèctor Alòs i Font.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre  
esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj  
ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080  
Barcelona

Imprès a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91  
Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

**Alfonso Tur Thomas** el Barcelono  
forpasis komence de januaro 2002, post  
longa malsano. Ni kondolencas liajn  
familianojn.

**Lluís M. Hernández Yzal** el St.Pau  
d'Ordal forpasis la 24an de februaro 2002,  
84-jara. Nia asocio kortuŝe adiaŭas sian  
fidelan membron kaj kondolencas plej  
sincere liajn familianojn. (*en venonta  
revuo ni aperigos lian biografion*).

## 31a KATALUNA KAJ 4a TRANSPIRENEA KONGRESO DE ESPERANTO

Jen frontpaĝe kongresurba foto de nia tiea  
aktivulo Mateu Vich.

La preparlaboroj rapide progresas, sed la  
aliĝilon ni sendos kun la venonta revuo.

La kongresejo estas kultura domo "Can  
Dulce" (pron.kan dulce) kiu situas tre  
proksime de la urbodomo kaj de la  
stacidomo.

Por loĝado ni antaŭmendis 30-ĉambran  
hoteleton kiu kostas 49 eŭrojn por persono  
kaj nokto kun matenmanĝo. La junuloj  
povos tranokti en la kongresejo kun  
dormosakó.

Ni organizas kolektivan aviadilan vojaĝon  
kiu kostos proksimume 150 eŭrojn. La iró  
okazos aviadile kaj trajne ĝis Sóller kaj la  
reveno buse kaj aviadile. Urĝas certigi tuj  
la totalan nombron da vojaĝontoj pro  
postulo de la aviadila kompanio. **Nepre tuj  
informu nin** pri via preteco vojaĝi kun ni,  
sen atendi la aliĝilon. Ni antaŭmendis nur  
28 lokojn kun ebla ampleksigo se ni tuj  
reagas.

## BARCELONA ESPERANTO- KONTAKTEJO (BEK)

Se vi deziras praktiki kaj plibonigi  
Esperanton, jen via rekomendinda  
kontaktejo en Barcelono (ĉe Librejo  
Clàssic) Padilla, 196. Dum labortagoj  
malfermiĝas de la 16'30 ĝis la 20'30 h. kaj  
sabate de la 10'00 ĝis la 14'00.h.  
telefono+fakso 93-246 37 36. retadreso:  
[karulo@esperanto-ct.org](mailto:karulo@esperanto-ct.org)

[WWW.ESPERANTO-CT.ORG](http://WWW.ESPERANTO-CT.ORG)

Jen la nova reta hejmo de la kataluna  
esperantistaro. Nova TTT-sidejo dulingva  
(kataluna kaj internacia), esprimilo de  
Kataluna E-Asocio kaj de ties membroj,  
lokaj kaj fakaj grupoj. Ĝenerala informado:  
[info@esperanto.ct.org](mailto:info@esperanto.ct.org)

## Protokolo de la Ordinara Asembleo de KEA okazinta la 16an de februaro 2002 ĉe Centro de Esperanto Sabadell

La Asembleo komenciĝas je la 17a h. je dua kunvoko kun la ĉeesto de 19 membroj. Sin ekskuzas Abel Montagut kaj Pedro M. Martin Burutxaga.

Aprobiĝas sen modifoj kaj la tagordo kaj antaŭa protokolo.

Oni legas kaj komentas la agadraporton de nia asocio dum 2001 kaj oni aprobas ankaŭ ĝin unuanime.

La kasisto daŭrigas per legado kaj komento de la spezaro kaj bilanco de nia asocio dum 2001 kaj la kontrolo komisiono rekomendas ĝin aprobi analizinte la librotenadon. La Asembleo tiel faras.

Kiel anoncite en la tagordo oni paŭzas kelkajn minutojn.

La dua parto de la Asembleo komenciĝas per pritrakto de la kompletigo de la estraro. La prezidantino Neus Moly, kiu rajtis je dua trijara mandato, rezignas kaj ĉar kandidatoj ne prezentiĝis, ŝi proponas nomumi plenrajtan ĝeneralan direktoron. La propono montriĝas neebla, ĉar nia asocio ne kapablas pagi iun ajn salajrulon kaj cetere la decidpovo laŭ la statuto apartenas nure kaj sole al la estraro. Finfine Josep Franquesa akceptas la prezidantecon kaj Llibert Puig akceptas

duan mandaton kiel kasiston kaj agantan ĝeneralan sekretarion dum oni trovas efektivan ĝeneralan sekretarion. Akceptas estraraniĝi ankaŭ kaj Joan Inglada el Vilanova i la Geltrú kaj Arnald Massanas el Ĝirono. Por faciligi la estraran laboron, oni proponas, ke la kontaktoj kaj decidoj okazu ĉefe per la reto kaj nur de tempo al tempo kunveni fizike.

Neus Moly akceptas tamen plu reprezenti KEA-n ĉe FOCIR, kion la Asembleo dankas.

Por la jaro 2002 oni aprobas la buĝeton kaj la novan 25-eŭran kotizon. Oni aprobas helpi al la starigo de Esperanto-informcentro en Bruselo per pago de 100-eŭra kotizo por 2002. Pri la Premio Delfí Dalmau oni informas ke la familio Dalmau pretas kontribui per 150 eŭroj jare al la ĝisnuna premio kaj rekomendas ke ni devus strebi laŭcele atingi premion de 600 eŭroj.

Pri agado oni proponas efektiviĝi krom la specialan Kongreson en Sóller, fakajn renkontiĝojn unutagajn aŭ semajnfinajn. Oni mencias la intereson pri informiloj kaj instruado. Proponoj de niaj membroj tiucele estos bonvenaj.

Ĉe la lasta ero de la tagordo intervenas Óscar Puig kiu prezentas la novan TTT-paĝon de nia asocio prilaboritan de Joan Inglada kaj ankaŭ li informas pri la agado kaj projektoj de la humanitara organizo Espero kun rekomendo aliĝi al ĝi. Li distribuas al ĉiuj ĉeestantoj skribajn informilojn pri ambaŭ.

---

# NIA AGADO

---

## ENSPEZOJ

Membrokotizoj	605.700
2001 Dumvivaj Membroj	20.450
Libroservo	210.757
Perado revuoj + UK + IJK	868.397
Arangoj diversaj	90.000
Kataluna Kongreso	358.400
Subvencio FOCIR	100.000
Koresponda kurso	10.650
Fondajo komputilo	10.000
Diversaj	857
Deficito	12.749
<b>TOTALO</b>	<b>2.287.960</b>

## ELSPEZOJ

Administrado	127.239
Kataluna Kongreso	761.793
Arangoj diversaj	153.571
Sidejo	60.000
Libroservo	120.016
Perado revuoj + UK + IJK	698.625
Kataluna Esperantisto	270.803
Bankaj elspezoj	42.913
Nepagitaj kotizoj	53.000
<b>TOTALO</b>	<b>2.287.960</b>

---

## AKTIVO

Kuranta kaso	47.056
Konto Sparkaso	756.762
Libroserva stoko	140.862
Kredita saldo ce UEA	3.381
Komputilo 54.912-27.456 amortizo	27.456
Fotokopiilo 52.000 - 26.000 amortizo	26.000
Deficito	12.749
<b>TOTALO</b>	<b>1.014.266</b>

## PASIVO

Asocia bonhavo	518.373
Dumvivaj membroj (99700-20450)	79.250
KEJ (pagotaj ktizoj)	77.024
Patronaro P.Nuez	171.720
Fondajo komputilo	32.500
Pagotaj Pres Graf	85.399
Pagotaj "Kaj Tiel Plu"	50.000
<b>TOTALO</b>	<b>1.014.266</b>

## STRASBURGO, BONA JUNULARA SPERTO

La vojaĝo komenciĝis la lastajn tagojn de julio. Tri gesabadellanoj iris por resti unu semajnon en Esperantujo, en la IJK de Strasburgo. Por unu el ili tiu ĉi esperantista kunveno ne estis la unua. Por la aliaj du, ankoraŭ lernantoj de elementa kurso, ĝi estis ilia unua sperto.

Ili foriris frumatene. Dum la vojaĝo ili ne parolis multe en Esperanto, sed ili aŭskultis la muzikon de la radio-kasedo, kiu memoris al ili ke en la venonta tago ili parolos tuttempe en Esperanto. Ili aŭskultis "Kaj Tiel Plu".

La vojo estis longa. Pro tio la gevojaĝantoj dividis ĝin en du tagojn, profitante la unuan por fari iomete da turismo en Cluny, en la regiono de la "Bourgogne".

Kaj tiel alvenis la momento de la prezentado, dimanĉon vespere. La unua kontakto estis tre komplika. Estis varmege. La organizantoj havis multan laboron pro la multaj homoj, kiuj volis partopreni en la Junulara Kongreso. La senditaj aliĝiloj de Carles kaj Glòria ne bone alvenis kaj la datumoj, kiujn la organizantoj havis, estis ankaŭ ne bonaj. La lingvo, dum la unua tago, estis grava komunik-barilo por la novlernantoj, kiuj ne ricevis la menditan ĉambron. Ili pensis ankaŭ pagi per kreditkarto, kion la organizantoj ne antaŭvidis. Sen mono ili ne povis resti en la kongresejo. Tre malfacile ili povis kunigi la monon kaj pagi. Certe multe pli koste ol en aliaj kongresoj, kiel poste klarigis al ili aliaj partoprenantoj. Ili gastis en unu ĉambro por tri homoj kun la alia sabadellano.

Poste estis la momento de la vespermanĝo (neabunda dum la tuta semajno) kaj tie ili malkovris novan fuŝon. La organizantoj ne atendis tiom da homoj. Ili aldonis du italajn junulojn en la ĉambro de la gesabadellanoj. La ĉambro estis plenega. Definitive, la unua tago en Esperantujo estis ne tre bona.

Sed la malbonaj kondiĉoj ŝanĝiĝis dum la dua tago. La daŭra kono de gejunuloj el la tuta mondo kaj la konstato, ke parolante Esperanton la homoj sin komprenas bone, kontentigis la lernantojn. Tiu ĉi fakto rapide ŝanĝis la opinion de unu el la sabadellaj lernantoj.

Kiel multaj partoprenantoj diris, tiu ĉi kongreso estis malsimila al la aliaj, ĉar ĝi havis multajn ekskursojn (Nigra Arbado, Kolmar, Bierfarejo de Kronenburg, Eŭropa Parlamento kaj Eŭropa Konsilio). La problemo de la lingvo en la Eŭropa Parlamento vekis multan intereson. La lernantoj malkovris unu el la temoj verŝajne preferaj en la esperantista mondo. Multaj aranĝoj kaj debatoj pri plurlingvismo en Eŭropo okazis samtempe en la kongresejo. La sabadellaj partoprenantoj kutime elektis ekskursi kaj tie ili konis multajn homojn el la tuta mondo. Carles komentis ke dum unu tago li parolis kun gejunuloj el 15 aŭ 16 nacioj.

Kaj kiam la nokto alvenis, la vespera programo komenciĝis. Unue muzikaj koncertoj de la plej konataj esperantistaj grupoj, kiel Jomo aŭ la muziko de Solotronic. Kaj je la fino la diskoteko ĝis malfruege. La lingvo nun kaŭzis neniun problemon, ĉar la du lernantoj multe plilertiĝis.

La tagoj pasis tre rapide. Por reveni al Katalunio, unu nova kongresano aldoniĝis. Li estis Mateu el Majoroko. La vojaĝo estis tre agrabla. Post la alveno la lernantoj decidis partopreni en aliaj esperantistaj kongresoj, ĉar la unua sperto estis bonega. Kaj ili ankaŭ klopodos iri kun aliaj esperantistoj. Ĉu verŝajne vi?

(raportis Carles kaj Gloria)

---

# KUNLABORAĴOJ

---

## PRI LA KATALUNA KONGRESO

Post okdek jaroj denove ni kongresas en Ĝirono. Ĉifoje riĉigante la renkontiĝon niaj transpireneaj gesamideanoj.

Okdek jaroj!! Ĉu vi scias kiom da lingvoj malaperis dum la lastaj okdek jaroj? Se vi havas eblecon legu la katalunan ĉiusemajnan kromĵurnalon "Presència" n-ro 1551 sub la titolo: "L'agonia de Babel" (La agonio de Babelo).

Tamen, ni esperantistoj ne obstine sed kuraĝe staras, en Ĝirono, Zagrebo aŭ...ie ajn!! Nu...ne plu filozofu!!

Laŭ mia opinio la Kongreso estis sufiĉe sukcesa, malgraŭ la neĉeesto de JOMO (bedaŭrinde!!). Ni ĝuis, feliĉe, per la kantoj de Georgo Handzlik (superbe!!). Ankaŭ oni regalas nin per dancoj kaj la ege amuza teatraĵo de Tuluza grupo tre interesa. Ni havis ŝancon malkovri Ĝironon dum ekskursoj kaj promenadoj. Ni povis lerni tradiciajn dancojn, partopreni prelegojn kaj aliajn interesajn kongresajn aferojn.

Speciale kortuŝa estis la ĉeesto de S-ro Salvador Gumà, kiu antaŭ nelonge festis sian 100-jaran naskiĝdatrevenon.

Aliflanke ni havis eblecon aĉeti ĉe Libroservo, krom ĉiuspecajn librojn, la KO-diskon de "Esperanto Desperado": "Brokantaĵoj" (rapide elĉerpita en la lasta UK). Mi pensas ke estas bonege por Esperantujo la publikigo de porjunula muziko kaj ĝia diskonigo ĉe Kongresoj. (Antoni Badia-Lleida)

## HELPPETO POR FUNKCIIGI LA PROJEKTON "PER-A-POR E"

Ĝin iniciatis la Jilin-provinca Esperanto-Instituto en Ĉinio. "Per-A-Por E" signifas "pere de anglalingva instruado, por Esperanto-disvastigado"

Eble tuj al vi venas la demando: kial vi intencas disvastigi Esperanton pere de anglalingva instruado en Ĉinio? Ni unue prezentu la aferon per kelkaj faktoj kaj ekzemploj:

1.-Almenaŭ ĉiuj lernantoj en Ĉinio devigite lernas la anglan inter 13 ĝis 18 jaroj, kaj se ili fariĝos studentoj de universitato, tio daŭros ankoraŭ pliajn 3-4 jarojn.

2.-En kelkcent urboj en Ĉinio, multaj gepatroj pagas, por ke ilia sola fil(in)o lernu la anglan de sia infaneco.

3.-Ne nur la Pekina, sed ankaŭ aliaj urbaj registaroj jam oficiale funkciigis la projekton "Ĉiuj urbanoj lernu la anglan"..

Lastjare laboris en ĉinaj universitatoj kelkaj alilandaj instruistoj esperantistaj, s-ino Robin el Usono, ges-roj Johano el Aŭstralio, s-ro Rode el Britio kaj s-ro Paŭlo el Aŭstralio, kiuj siavice starigis Esperanto-kursojn en la universitatoj, kie ili laboris, viglege partoprenis en ĉinaj Esperanto-kunvenoj kaj valore kontribuis al ĉina Esperanto-movado. Nia projekto celas instigi tion. Jen ĝiaj ĉefaj punktoj :

1.-Nia Instituto finance funkciigos la projekton dum ĝia komenca periodo.

2.-Ni provizos senpage al la invititaj esperantistaj instruistoj loĝadon kaj manĝadon.

3.-Ni pagos al ili rekompencan ne altan, sed tamen taŭgan.

4.-Ni prizorgos ĉiujn aferojn rilate la lokan registaron.

5.-Ni administros la projekton por ke ĝi finfine fariĝu memstara finance. Kio poste? Popularigi la praktikon tra Ĉinio.

En la komenco ni intencas inviti 4-8 anglalingvajn instruistojn esperantistajn alilandajn, kompetentajn pri la angla kaj Esperanto.

Bonvolu diskonigi nian projekton. Interesatoj sin turnu al: Jilin Esperanto-Instituto [kokosoto@263.net](mailto:kokosoto@263.net) aŭ [kokosoto@163.net](mailto:kokosoto@163.net)

## BOSNIA LILIO

Jen en niaj manoj la laste aperinta gazeto de Esperanto-Ligo de Bosnio Hercegovino n-ro 5 (1/2001) jaro 5, kiun ni ĵus ricevis. Frontpaĝe videblas foto kun kelkaj partoprenantoj en la Renkontiĝo de Geamikoj pri Internacia Solidareco (Sarajevo 2001) okazinta post la Zagreba Kongreso.

Kiel kutime la bosna gazeto estas leginda ĉar la artikoloj estas tre interesaj. Jen resumo de la ĉefartikolo titolita "Sojle de la nova jarmilo" kiu bone klarigas la enhavon:

"Jen nova numero de *"Bosnia Lilio"*!. En ĝi vi povas legi pri fenomeno terorismo. Kiu politiko, en la nunaj internaciaj rilatoj venkas? Ĉu reala aŭ morala?. Vi povas legi ankaŭ pri spertoj de Bosnio kaj Hercegovino kaj ĝia loĝantaro pri ĝi pro ĉiutagaj torturado kaj terurado dum la milito (1992-1995).

Ĉefa temo estas Renkontiĝo de Geamikoj pri Internacia Solidareco "Sarajevo 2001" okazinta ĉi-jare en Sarajevo. Iom malgranda kunveno provokis grandan eĥon en Esperantio, precipe en ĝia gazetaro. En multaj E-gazetoj oni povis legi pri ĝi, sed ni publikigas la plej gravajn materialojn prezentitajn al partoprenantoj kun konkretaj raportoj pri ĝis nun realigitaj projektoj.

"Sarajevo 2001" estis vere internacia kunveno kiu montris unu al multaj direktoj kien povas kaj devas paŝi la Esperanto-movado. Laborante kadre de humanitara kampo la Esperanto-movado havos ŝancon disvastigi kaj plifortigi la movadon kaj la lingvon tra la tuta terglobo kaj demonstri al la neesperantistaro praktikajn valorojn de la lingvo.

Dum la milito en Bosnio estis detruitaj multaj religiaj kaj kulturaj objektoj. Evidente, ke tiuj objektoj estis unu el gravaj celoj de la agresintoj. Per ilia detruado la agresintoj intencis fakte detruiri bosnian spiriton. Kiom da islamaj religiaj objektoj estas detruitaj aŭ grave difektitaj vi povas legi en nia artikolo .

Nia rubriko pri humanitara agado de ESPERO raportas pri ekipiĝo de la sandomo en vilaĝo Klokočnica kaj pri plantita botanika ĝardeno en elementa lernejo en Sarajevo.

En Zagrebo okazis la 86a Universala Kongreso, kiun partoprenis 18 bosnianoj kaj unu el ili donas detalan raporton. Ankaŭ pri IJK en Strasburgo raportas bosniano proze kaj poezie.

Multaj bosnianoj pro la milito devis forlasi sian ŝtaton. Unu el ili atingis Esperantion en Slovakio, kie li esperantistiĝis. Poste li iris al Danio kie, interalie, muzikis en konata rok-grupo Esperanto-Desperado (vere internacia bando dana, pola kaj bosna)

Literaturaj paĝoj prezentas al vi buntan verkiston Zeljko Ivankovic per tri poemoj kaj rakonto.

Antaŭ vi do estas la unua numero de la gazeto en nova jarcento kaj jarmilo. Ni klopodis sekvi niajn plej bonajn tradiciojn sur tiu ĉi agad-kampo kaj ĉu ni sukcesis vi mem juĝos."

## 18a PRINTEMPA STAĜO DE

**ESPERANTO** okazos en Beziers-Vias en la kamphotelo de la "Dragonnière" inter la 22a kaj 29a de majo. Petu informojn kaj aliĝilon ĉe nia asocio.

## TRI POETOJ, TRI VIVOINTERPRETOJ (recenzo de Milena Makaveeva)

*Esperanta Songazeto* 12 enhavas kantojn, poezion kaj teatron. Nicolino Rossi intervjuas la muzikan gaston Valerio Mottola, kiu interese rakontas pri sia unua amo, la napola kanzono. Posedante tre riĉan napollingvan klasikan repertuaron, sperte tradukitan en nian lingvon, Mottola prezentas specimenojn de la napola kanzono per la muzika aranĝo de la gitaristo Generoso Romano. Kiam Valerio Mottola premieris per esperanta versio de la napolaj kanzonoj dum la 66a Kongreso de IEF, la publiko emocie aprobis la sukcesan interpretadon kaj ŝatis tiun renkontiĝon inter la belegaj klasikaj kanzonoj kaj esperanto. La publiko aprobis tiun kunfandon inter pasinto kaj estonto, ĉar ĝi kredas, ke esperanto daŭrigos sian vivon dank' al similaj bone realigitaj eksperimentoj. Ĝuste per ili nia lingvo serĉos sian indan lokon en la monda kulturo. Similaj kunfandoj ekzistos sukcese, nur se la interpretantoj amas sian arton, kiel Mottola faras, sukcese esperantiĝas kaj deziras riĉigi la esperantan kulturon per siaj spertoj kaj artkapabloj.

En la sama numero 12 de *Esperanta Songazeto* William Auld, la plej fama reprezentanto de la Skota Skolo kaj la plej brila poeto en nia lingvo, deklamas la unuan ĉapitron de *La Infana Raso*, la plej valora verko el la esperanta literaturo. Per la reĝisorado de Teo Jurukov, la Teatrofako de LF-Koop realigas radiofonie la teatraĵon de Giorgio Silfer *La vorta klaso*, jam aperintan en LF 168 kaj sur videobendo. La radiofonia varianto de la verko havas interesan kaj modernan solvon. La profesia ludo de la aktoroj multe kontribuas por la sukcesa realigo. Per la propra artisteco de Luna Davidova, Jerzy Fornal, Darinka Goranova, Nikolaj Ivanov, Teo Jurukov, Ivan Zlatarev,

Nikolaj Uzunov kaj Veneta Zjumbjuleva ĉiuj rolpersonoj estas bone individuigitaj, per la klaraj, ĝuste interpretitaj tonnuancoj, kaj eĉ per la voĉtembroj. Vere gratulinde!

Al ĉiuj kreantoj kaj realigantoj de *Esperanta Songazeto* – prosperan sukceson de ĉiuj bonaj ideoj dum la nova 2002!

(El Literatura Foiro n-ro 195 kun la afabla permeso de la redakcio)



Esperanta Songazeto n-ro 12  
Daŭro. 59' 20" Prezo 9 eŭroj